

	<h1>PENSEO</h1>	<i>N-ro 174</i> <i>aprilo./2006</i>
<b>Monata Beletro Revueto en Esperanto</b> <b>Honorita de Premio Grabowski, 1994</b>		
<b>Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 17-a jaro <a href="http://www.elerno.net/penseo/penlisto.htm">http://www.elerno.net/penseo/penlisto.htm</a></b>		

Zhu Ziqing (1898-1948)

## Rapidemo

**K**vankam hirundoj forflugis, ili tamen revenos; kvankam salikoj kaj poploj forvelkiĝis, ili tamen verdiĝos; kvankam persikfloroj jam forfalis, ili tamen prosperos.

Sed, Saĝulo, diru al mi, kial niaj tagoj pasis senrevene. Ĉu oni ŝtelis ilin? Kiuj ili estas? Kie ili sin kaŝas? Ĉu tiuj tagoj mem forfuĝis? Kien ili jam atingis?

Mi ne scias, kiom da tagoj ili donis al mi, sed nun mi ja sentas, ke miaj manoj vere malpleniĝas iom post iom. Laŭ mia mensa kalkulo, jam ok mil tagoj forglitis el miaj manoj. Kvazaŭ malgranda akvero en la maro, miaj tagoj gutadas en la tempfluon sensone, senpure. Mi konscias, ke mia frunto nevole ŝvitiĝas kaj miaj okuloj larmperlas.

La pasintaj jam forpasis, kaj la venontaj jam venis. Tamen kia rapidemo ekzistas inter la pasintaj kaj la venontaj? Kiam mi leviĝas matene, du aŭ tri kvadratetoj de sunlumo jam pafiĝas en mian ĉambreton. La sunlumo kviete kaj sensone moviĝas piede, kaj mi blinde sekvas la moviĝon. Kiam mi lavas miajn manojn, la tago pasis tra la lavpelvo; kiam mi prenis manĝon, la tago pasas preter la bovlo; kiam mi kontemplas, la tago pasas de antaŭ mia okulparo fiksrigardanta; kiam, konsciĝanta pri ĝia rapidemo, mi volas reteni ĝin, ĝi forglitas el miaj manoj; kiam mi enlitiĝas nokte, la tago lerte forsaltas trans mia korpo kaj forflugas el ĉe miaj piedoj. Kiam mi

revidiĝas kun sunlumo, unu tago jam malaperas. Kovrante mian vizaĝon, mi eligas suspirojn, kaj ombroj de la venontaj tagoj komencas fulmi tra miaj suspiroj.

En la fuĝe flugintaj tagoj, kion mi povis fari por la mondo kun miloj kaj miloj da familioj? Mi nur hezitis kaj nur rapidemis. Kio restas krom hezitemo, en la rapidemo de pli il ok mil tagoj? La pasintaj tagoj, kiel leĝera fumo, estas dispelitaj de zefiro, kaj kiel maldika nebulo, estas elvaporitaj de ĵusleviĝinta suno. Kia spuro restas ĉe mi? Mi venis nuda en ĉi tiun mondon, kaj ĉu mi revenos ankoraŭ nuda de ĉi tiu mondo en palpebrumo? Sed, la demandon, per kiu mi ne povas ne konvinki min mem, estas, pro kio mi devigas min veni en ĉi tiun mondon senfare kaj vane.

Vi saĝulo, diru al mi, kial miaj tagoj forpasis senrevene?

*Zhu Ziqing: fama ĉina prozisto kaj poeto*



elĉinigis **Zhu Sheng**

## Maljunulo kaj Birdo

Mu Mu

Maljunulo loĝas sola en tre granda ĝardeno, kie li kreskigas diversspecajn florojn kaj herbojn, kaj zorgeme akvumas kaj strekumas ilin ĉiutage.

Kvankam lia domo situas ĉe la strato, malmultaj vizitantoj venas. Kiam li estas

neokupita, li ŝatas kuŝi sur la kuŝseĝo kun fermitaj okuloj, aŭskultante okaza bruon de pasantaj veturiloj kaj homoj ekster la muro.

Iutage birdo kun flave verda plumaro enflugis en la korton trans la dekoloriĝinta muro, eligante sonorajn ĉirpadon. Ĝi rondflugis sub la tegmentrando, kvazaŭ vivigante la tutan korton. Vidinte tion, la maljunulo tre ĝojis. Li rapide alportis milion el la domo kaj surŝutis per milion la tutan korton por manĝigi ĝin.

De tiam la maljunulo ekhavis kompanieton. Ĉiun frumateno, la birdo alflugis kaj rondflugis kelkfoje sub la tegmentrando. Li disŝutis milion. Ĝis kiam ĝi manĝis sufiĉe, ĝi forfalis sur lian ŝultron por ripozi iom, kaj forflugis ĉirpe, frapante siajn flugilojn.

Iutage la maljunulo ekhavis subitan ideon restigi ĝin. Li etendis sian manon kaj kaptis la birdon ripozantan sur sia ŝultro. Ĝojplene li hastis en la domon por trovi kaĝon. Baraktante en lia mano, ĝi sukcesis eskapi tra la pordo pro lia neatentemo. Rigardante la senspurajn ĉielon, li, kun malespero, staris tie por longa tempo.

Por pluraj tagoj la birdo ne alflugis. Krom akvumi kaj sterkumi, li dronis en stuporo, kuŝante sur la kuŝseĝo.

Iun frumateno, li estis vekita de pepado de birdo. Tra la fenestra vitro, li vidis flavverdan birdon rondflugis en la korto. Li hasteme malfermis la pordon kaj disŝutis milion sur la korto. Li sentis tiel grandan ĝojon, ke li eĉ ne povis fermi sian buŝon. Post kiam la birdo sin manĝigis kaj ripozis sur lia ŝultro kiel kutime, ĝi neniel atendis, ke li mane kaptis ĝin denove. Kun baraktanta birdo en sia firma manpreno, li hasteme eniris la domon por preni kaĝon. Fine, kiam li trovis la kaĝon, li eligis longan spiron. La bambuplektita kaĝo, per kiu li estis teninta birdon, kiu forfuĝis poste, estis taŭga loĝejo por la flavverda birdo. Kiam li estis malstreĉonta sian prenon kaj metonta ĝin en la

kaĝon, li trovis, ke ĝi paceme kuŝas en lia mano kun fermitaj okuloj.

Li metis ĝin sur la ebenan teron de la korto kaj kuŝigis sin en la kuŝseĝon. Li fermis siajn okulojn, en kiuj malklaraj larmoj ruliĝis.

Kato enkuris kaj, buŝe kaptinta la birda kadavron, forkuris senspure.

La suno leviĝis kaj disŝutis siajn radiojn en al tuta korto.



elĉinigiis Kuliano

## El Libro de Poezio

### Survoja roso

*\*junulino rezistas kontraŭ viro, kiu jam edziĝis, sed intencas trude edzinigi ŝin, eĉ minacas ŝin per proceso sur juĝejo. Tamen ŝi neniel submetiĝas.*

Sur vojo estas rospene.

Ĉu mi iras frumatene

Kaj timas paŝi rospene?

Kiu diras, ke sen beko

Birdo tratuas salonon,

Kaj vi ankaŭ ne edziĝis,

Vi min prenos en prizanon?

Eĉ juĝejo vi implikos,

Truda proces' ne efikos.

Kiu diras, ke sen dentoj

Rat' tramordas muran celon,

Kaj vi ankaŭ ne edziĝis,

Vi min trenos en karceron?

Eĉ vi ĉe juĝejo kriĉos,

Mi neniel submetiĝos!



## ŝafidfela vesto

*\*oni mokas oficistojn de Zhou-dinastio, kiuj en ŝafidfelaj vestoj estas nenigaraj, post bongusta manĝo parade paŝas hejmen.*

Ŝafidfele vestas ili  
 Kun kvin punktoj silkaj bele.  
 De korteg' promenas ili  
 Hejmen post la manĝ' libere.  
 En surturoj ŝafidfelaj  
 Kun kvin punktoj silke belaj  
 Post la ofica regalo,  
 Ili pavas en hejmhalo.  
 En surturoj ŝafidfelaj  
 Kun kvin silkaj pasamentoj  
 Ili, de korteg', liberaj  
 Hejmen venas kun kontentoj.



## Dense tondras

*\*juna edzino vokas al sia edzo, kiu longe de la hejmo forestas por la regna servo.*

Tondras. La eĥo tre densa  
 Sude ĉe la monto restas.  
 Kial haste vi forestas?  
 Por publika serv' intensa.  
 Ho, honesta edzo mia,  
 Vi revenu, kara mia!  
 Tondras. L' eĥo furioza  
 Flanke ĉe la monto restas.  
 Kial haste vi forestas?  
 Por regnoserv' senripoza.  
 Ho, honesta edzo mia,  
 Vi revenu, kara mia!  
 Tondras. L' eĥa erupcio  
 Sude ĉe la monto restas.  
 Kial haste vi forestas?  
 Por funkcii sen ferio.

Ho, honesta edzo mia,  
 Vi revenu, kara mia!

## Umeoj falas

*\*junulino amas junulon, kaj kantante aŭdace esprimas sian amon.*

Surteren umeoj falu,  
 Restas surarbe triono.  
 Min amanta la persono  
 Lasi ŝancon ne eraru!  
 Surteren umeoj falu,  
 Restas ankoraŭ sepono.  
 Min amanta la persono,  
 Vi la kuraĝon ne ŝparu!  
 Tute la umeoj falas,  
 Jam en korbo estas plena.  
 Vi, junulo amĉagrena,  
 Kial vi ne am-deklaras!



Elĉinigris Sceto

## Mezsomera Nokto

Gu Shan

du ventoj renkontiĝas  
 printempa tondro skuas  
 en nokt' mezsomera  
 la ama frukt' formiĝas

troviĝas pluvo tie kaj ĉi tie  
 samkiel sopiregoj niaj  
 turmente aŭtun-flaviĝintaj  
 plenigas rememoron post falado

solec' naskiĝas en ventoza nokto  
 fluetas kiel intermonta roĵo  
 ĉu dolĉa aŭ acida, juĝi malfacile  
 ellernas ami ambaŭ malrapide  
 elĉinigris **Hong Yun**

